Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43**

**N-RO 6** | 2007 07 20, VENDREDO

## URBESTRA AKCEPTO, KANKLA KONCERTO





Marde, la 17an de julio okazis en la urbodomo la urbestra akcepto de la delegacio de BET-43. La urbestro Genadijus MIKŠYS, la alta protektanto de BET-43, prezentis la urbon Šiauliai, kiu nun rimarkinde evoluas industrie, ekonomie, kulture, sporte, turimse ktp. Zenonas SABALYS atentigis al la urbestro preterlason de tre grava fakto, ke en Šiauliai de 80 jaroj aktivas Esperanto-klubo. Lian paroladon interpretis Gražina OPULSKIENĖ. La prezidanto de la organiza komitato de BET-43 kaj de Litova Esperanto-Asocio Povilas JEGOROVAS donacis sep librojn pri Esperanto al la urbestro. Ĉe la fino esperantistoj estis regalitaj per frukto, kuko, kafo kaj aliaj.



Post la urbestra akcepto okazis la koncerto de la ensemblo "Aušrinė" de tri kanklistinoj kaj kantistino Jurga JUOZŪNIENĖ. Melodiriĉa kanklado kaj belvoĉa kantado multege superis kadukecon de la salono.



# FOTORAPORTO DE LA TUTTAGA EKSKURSO



**La ekskursanoj en Šiluva**

Merkrede, la 18an de julio kvindeko da esperantistoj faris la tuttagan ekskurson. La unua numero de "SAGISTO" bone priskribas la vizititajn lokojn dum la ekskurso. Jen estas fotoj, kiuj rememorigas la ekskurson. La ekskursanoj kore dankas al Romualdas RUTKAUSKAS, Petras ČELIAUSKAS kaj Gražina OPULSKIENĖ pro gvidado kaj interpretado.



**Kolegio fondita en 1614 en Kražai**



**Baroka preĝejo en Tytuvėnai**



Romualdas RUTKAUSKAS entuziasme ĉiĉeronis kaj faris kvazaŭ historian lecionon en la buso.



Jan BEMBELMANS palpas dinosaŭrtempan fosilion en la regiona muzeo Kelmė.



**La pordo kun tri funkcioj: biblioteko, prizono kaj trapasejo**



**Ekskursis ne nur ni, sed ankaŭ beto, karoto, terpomo kaj porkaĵo ekskursis en nia stomako.**



**Surgenue ni iris sur 30 ŝtupojn, ĉar tie muntita estas la sankta relikvo el Jerusalemo.**

# RAPORTO

www.lernu.net





www.amikumu.com

La 18an de julio matene, dum plimulto de la partoprenantoj de BET partoprenis la tuttagan ekskurson, okazis en la kongresejo kurso pri Esperanto kaj Interreto. Yves NEVELSTEEN, aktivulo de E@I, prelegis pri la retejoj www.lernu.net kaj www.amikumu.com.

Ĉar la ok junaj partoprenantoj ankoraŭ ne bone komprenas Esperanton, la preleganto uzis la retan vortaron Esperanto-Litova de www.lernu.net por traduki kelkajn ŝlosilvortojn. Tiel ĉi la prelego por la gejunuloj estis sufiĉe bone komprenebla. Kiam ekestis miskomprenoj, tradukis Liepinia GENOVAITĖ, kiu instruas al ili Esperanton en lernejo.

Post la prelego okazis praktikado. Ni kune kreis kontojn por Lernu.net kaj Amikumu kaj la gejunuloj eksciis kiel sendi mesaĝojn al esperantistoj kun sama interesiĝo, kie trovi kursojn pri Esperanto ktp.

Jūratė PUPŠTAITĖ, sekretariino de Litova Esperanto-Asocio, invitis ĵurnalistinon de la loka televido. Oni intervjuis du infanojn kaj la preleganton.

Ĉar ni kreis kontojn, la gejunuloj ekzemple aŭtomate ricevos mesaĝon, kiam ili festos siajn naskiĝdatrevenojn. Se dum iom da tempo ili ne plu estos vizitintaj la retejojn, aŭtomata mesaĝo invitos ilin reviziti ĝin. Povas esti grava instigo daŭrigi la lernadon de la internacia lingvo.

Ne estis planita de antaŭe tiu ĉi kurso kaj ankaŭ la loka televidstacio nur lastmomente estis kontaktita. Estis tre sukcesa kurso; la gejunuloj multe miris kaj entuziasmis pri la diversaj eblecoj uzi Esperanton en Interreto.

**Raportas: Yves NEVELSTEEN - Flandrio (Belgio)**

## KIO OKAZOS HODIAŬ

### 20an de julio (vendrede)

09:00–11:00 Lecionoj de ĉiunivelaj E-kursoj
*Aŭditorioj 6, 8, 9 kaj 15*

09:00–11:00 Somera universitato. Prelegoj Nijolė PETRAITYTĖ "Sekretaj vojoj de litova libro en la kuniĝo de XIX-XX jarcentoj" kaj Jazeps ŠLARS "Baronino Bertha de SUTTNER – sekretariino de Alfred NOBEL"
*Aŭditorio 17*

10:00–11:00 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo
*Aŭditorio 10*

11:00–12:00 Prezentado de la filmo pri "Universalaj Kongresoj de Esperanto" kaj prelego de Michael CWIK
*Aŭditorio 7*

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00–18:00 Belartaj konkuroj de MUZO-2007
*Aŭditorio 22*

14:00–16:00 Somera universitato.Prelegoj de Tuomo GRUNDSTROM "Pri la fenomeno literaturo en finnaj dialektoj" kaj Raita PYHALA "Malnova saŭno kaj saŭnokulturo en Finnlando"
*Aŭditorio 17*

18:00–19:00 Koncerto de ensembloj "Želmenėliai" kaj "Dermė"
*Ĉefsalono*

### Programŝanĝo

La prelego de Danutė KELIUOTIENĖ pri "Bona humoro kaj amo" ne okazos. Anstataŭ ĝi okazos prezentado de 15-minuta filmo pri Universalaj Kongresoj de Esperanto kiel ekzemplo pri "daŭra dialogo inter la kulturoj (The World Esperanto Congresss — A permanent dialogue between cultures". La filmo estis farita de Michael CWIK sur demando de UEA orezenti kontribuon kadre de la jara kongreso de UNESCO.

La prezentado okazos hodiaŭ, 20an de julio je 11:00 en aŭditorio 7 en la unua etaĝo.

Post la filmo estas ebleco aŭskulti prelegon de Michael CWIK pri "Kiel atingi nediskriminacion en interetna, interkultura kaj internacia komunikado sur meztempa horizonto? Teoria kaj praktika solvo por multlingvaj komunumoj kaj intenaciaj organizoj".

## ANONCOJ

### Pri fotoj en "SAGISTO"

La plejparto de la fotoj, kiuj aperis en ĉiu numero de "SAGISTO" estis farita de la redaktoro mem. La redaktoro post iom da tempo aperigos ilin en la retejo de Litova Esperanto-Asocio (http://www.esperanto.lt) kaj ankaŭ volonte sendos retpoŝte petitajn fotojn al tiuj, kiuj volas. Kiu absolute ne havas interretan aliron, skribu normalpoŝte al la jena adreso: CHOE Taesok, M.K. Čiurlionio gatvė 6-9, LT-03104 Vilnius, Litovio.

### Traduku en vian gepatran lingvon

Karaj BET-anoj,

La furora finna poetino Heli LAAKSONEN, verkanta en la sudokcidenta, originala dialekto, kolektas tradukojn de ĉi tiu sia poemeto en diversaj lingvoj. Donu la vian al Tuomo GRUNDSTROM persone dum BET aŭ retpoŝte: tuomo.grundstrom@lailanet.fi

***BOVINO KAJ BETULO***

*Mi volas esti bovino sub betulo.*

*Mi ne volas esti kreiva.*
*Mi ne volas ellerni novan enpaĝigan programon.*
*Mi ne volas solvi la rilaton inter patrino kaj filino.*
*Mi ne volas iri al la poŝtejo kun tiu letero.*
*Mi ne volas telefoni al sinjorino oficisto pri sociasekuro.*
*Mi ne volas enmemorigi "pin"-kodojn.*

*Lasu min esti bovino sub betulo.*
*Metu mian lacan haŭton sur plankon dormoĉambran,*
*antaŭ kahelan fornon.*

Poemo origine en la sudokcidenta finna dialekto de Heli LAAKSONEN el la kolekto Pulu uis (Naĝis kolombo), Turku 2000

*INVITAS MUZO-2007*

La konkursoj okazos en la branĉoj de prozo, poezio, kantoteksto, melodio, deklamado, arta legado, rakontado, fotoj kaj pentraĵoj.

**Hodiaŭ, vendrede, je 14:00-18:00**
**Aŭditorio 22 en la tria etaĝo**

### El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadreso: ds@esperanto.lt aŭ en la redakcia kaj la organizkomitata ĉambroj.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 12a horo de la kuranta tago**. Ĉi tiun numeron redaktis CHOE Taesok.